1re Année. Le Numéro : 10 cts. Janvier 1911.

# LA DEK-SEPA

Bulletin Mensuel Espérantiste
servi gratuitement aux membres de la Section du XVIIe Arrt
du Groupe Espérantiste de Paris.

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : H. de COPPET
179, Boulevard Pereire, Paris.

ABONNEMENT : 1 franc par an. — Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :
Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

## Bonan Jaron !

Al ĉiuj membroj de nia Sekcio kaj gelegantoj de la « DEK-SEPA », la Redakcio de l' bulteno prezentas siajn plej korajn bondezirojn por la nova jaro.

## Remercîments

La Section du Dix-Septième Arrondissement remercie chaleureusement notre « samideano » M. Camille Aymonier, professeur agrégé de l'Université, pour la très charmante conférence qu'il a faite à notre dernière fête.

Nous sommes également profondément reconnaissants à Mesdemoiselles Moët de Crèvecœur, Louise Rémond, Henriette Gaston, Thérèse et Yvonne Méras ; à Messieurs Sidonac, Nangis, Georges Bœuf, Max, et Bussolazzi, qui ont bien voulu prêter leur concours à notre matinée.

Nous n'oublions pas la magistrale chorale Galin-Paris-Chevé dont l'éloge n'est plus à faire et qui d'ailleurs contient dans son sein plusieurs espérantistes.

Que Messieurs Faure du Bouvet et Marcilly, ses deux directeurs, reçoivent ici l'expression de nos chaleureux remerciments.

*Le Comité de la Section du 17e Arrt.*

# Groupe Espérantiste de Paris - Section du XVIIe Arrondissement

Réunions amicales tous les Mercredis soirs à 9 heures, Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière. Téléphone 530-46. Métro : Pereire.

## Cours Supérieur d'Esperanto.

Notre Président, M. H. de Coppet, fait tous les Jeudis soirs un Cours Supérieur d'Esperanto, à l'Ecole Communale, 7, rue St-Ferdinand.

La conversation joue un très grand rôle dans ce cours; nous ne saurions trop insister auprès de nos « Sekcianoj » de suivre ce cours pratique, s'ils veulent faire de rapides progrès dans la langue.

## Cours Elémentaire d'Esperanto.

Le Cours Elémentaire d'Esperanto est fait cette année par M. Lionel Chilard, Atestulo de notre Groupe. Ce cours est suivi actuellement par une vingtaine d'élèves.

## Conférences

faites au siège même de la Section, 6, Place Pereire.

4 Janvier. — M. Paul de Lengyel : Fuŝaĵoj (Bousillages).
11 Janvier. — M. Sprotté : Miaj ideoj kaj projektoj pri la propagando de Esperanto en orientaj landoj.
18 Janvier. — M. Georges Kolowrat : Pri Montenegro.
25 Janvier. — M. Lionel Chilard : Congrès de l'U. E. A. à Augsbourg (avec projections).
1er Février. M. Henri van Etten : La balotoj en Anglolando.
8 Février. — M. Oblin : Pri iaĵoj.

# KRISTNASKA RAKONTO

## La vindotukoj de Jesuo

La katedra preĝejo de « Aix-la-Chapelle » posedas inter siaj riĉajoj la vestajeton de l'Infano Jesuo. Estas sankta kaj dolĉa restajo kaj multaj vizitantoj venas por respektegi ĝin.

La 24-an de Decembro 1894, antaŭtago de Kristnasko, la pedelo Matias Glogaŭ tualetigis la trezoron, komisiitan al sia zorgado, kaj kiu devis esti elmetita je la festo de l'morgaŭa tago.

Tiu-ĉi Matias Glogaŭ estis ĝibula kaj lamula vireto, posedante elkreskajon sur la nazo.

Al tiu malbelega vizaĝo la sorto rezervis la privilegion esti la homa kunvivanto en la sankta restajo, adorinda inter ĉiuj aliaj. Oni ne devas miri aŭ plendi pri tio, sed male, konsideri ke, sendube, li estis tiel elektita de la Dia Volo por montri, ke la plej humilaj kaj la plej malfavorulaj estas la plej proksimaj de l'ĉiela reĝolando.

Sed la ĝibula pedelo ne konsciis, ke li estis elektigita estajo, kaj la mirinda karaktero de sia rolo sentigis al li nek kortuŝecon nek malhumilecon. De dudek jaroj, ke li estis puriganta la katedrajn kandelegojn, kaj vivanta en la intimeco de l'trezoro, li ne sentis plu ĝian radian lumon. — Li eĉ ne faris plu la krucsignon antaŭ ol tuŝi la sanktajn restajojn kaj zorgis ilin kun la sama maŝinmaniera indiferenteco, kiel li iam batis siajn ledplandojn, en la tempo kiam li estis pantoflisto. — Estas tial ke, en tiu-ĉi tago, malfermante la ŝrankon, en kiu la vindotukoj de l'Infano Jesuo estis multekoste enfermitaj, li fajfetis malgrandan dancarion kaj pensis en si mem :

— Nu, ne agrable estas promeni hodiaŭ ekstere !

Perforta vento blovis efektive sur la urbon, dehokigis la elpendajojn de l'komercistoj kaj ekmovigis la kamentubojn sur la pintformaj tegmentoj.

Matias Glogaŭ ŝirmita en la sanktejo aŭskultis la siblojn kaj la murmuregojn de l'ventego. Li pensis, ke tiu-ĉi furiozeco malmulte konformiĝis kun la festo en preparado.

Sed, sendube, ekzistis en tio frapanta simbolo kaj eble la malkvietaj elementoj subite trankviliĝus tuj, kiam elfalos la konataj parolaj de pardono kaj kompato :

— « Paco sur la tero. — Bonvolo inter la homoj ! ! ! »

La pedelo pretiĝis tuŝi senzorgade kun sia maldelikata

mano la diajn vindotukojn, kiam nekredebla okazaĵo prezentiĝis.

Sub la venta puŝego, la fenestro de l' preĝeja antaŭĉambro subite malfermiĝis. — La turnovento eniris kiel ekokupo de barbaroj! Ĝi puŝegis ĉion en la sanktejo, renversis la sanktajn objektojn; kaj la vindotukoj de l' malgranda Jesuo, kunportitaj de l' turnovento, forflugis tra la fenestro.

Unue, Matiaso staris malsprita, plena je timegeco, poste, kiam li rekonsciis, li antaŭensaltis en la preĝejon kriante:

— Sankta Josefo! Sankta Martino! Helpu min!! La vento forflugis la vindotukojn!

Aŭdante tiun-ĉi maltranviligitan voĉon, personoj elaperis de ĉiuloke. La pastroj kun sanktaj survestoj, la pedelo kun sia ĉapeto, la Svisisto kun sia halebardo, la maljunaj virinoj, kiuj estis preĝantaj en la preĝejo alkuris kun palaj mienoj kaj teruriĝitaj okuloj.

Kriegoj aŭdiĝis.

— Kion vi diras, Matiaso, Sankta Virgulino! Kion vi diras!!

La malgranda ĝibulo galopis al la pordo. Li ŝajnis frapita per frenezeco.

— La vindotukoj! Kia malfeliĉo! La vindotukoj!!! Tra la fenestro!!! Blovo de turnovento!!! Ni alkuru rapide rekapti ilin!!!

Tiam, en la strato, subite tumultiĝinta, ĉiu ekkuris por ekkapti la forflugintajn vindotukojn!!!

— Kie ili troviĝas?

— Ĉu vi vidas ion?

Nazoj en la aero similis je demandaj punktoj!!

— Tie, diris unuj.

— Tute ne, la vento certe forportis ilin al la rivero « Wurm ».

Fine, oni eltrovis la forflugantajn tukojn.

Ili estis blokitaj en angulo de kapitelo, sur malalta flanko de l' preĝejo. Ili ŝajnis tute kiel frostsentema kolombo trapikita de malvarmo, rifuĝinta en tiu-ĉi protektejo.

— Jen ili estas! jen ili estas!!

Ĉiu samtempe kriegis. Sed kiel atingi ilin!

— Estas la devo de l' pedelo, ĉar li lasis ilin forflugi, diris ili unuvoĉe. Nun, Matiaso ne fajfetis plu!!

Subite, kuraĝa homo antaŭensaltis, suprenrampis laŭlonge la kolonojn, alkroĉiĝis je la dentaĵoj, alpendiĝis ĉe la elstaraĵoj; post mil danĝeroj, li fine estis atingonta la celon

kaj jam etendis la manon por ekkapti la vindotukojn... Sed,... frt... en la preciza momento, tiuj-ĉi forflugis de ilia loko kaj direktiĝis sur najbaran tegmenton. Oni rapidis tien por rekapti ilin, Tiuj-ĉi atendis ĝis la manoj etendiĝis tute proksime, poste, ili reprenis sian aervojon sur la alian flankon de l' strato.

Tiam, komencis malsaĝeca kurado.

De tegmento al tegmento, de strato al strato, la diaj vindotukoj forflugis kaj la tuta amaso postkuregis.

Kia ĉasado! La pastroj ruĝaj, plenaj je indigneco kaj spirego, levis la brakojn, kriegis ordonojn kaj faris frenezajn signojn. — La svisisto sekvis ilin kun sia senutila halebardo. La malgranda ĝibula pedelo ankaŭ kuregis lau sia tuta ebla rapideco per siaj lamaj kruroj; kaj malantaŭe, venis la maljunaj virinoj kun lambastonoj ĉagreniĝantaj kaj alvokantaj la nomon de Sankta Mario!!

La urbo mem baldaŭ fariĝis ekkaptita de tiu ekstrema malkvieteco. — Al la freneziĝintaj pastroj kaj al la maljunaj piulinoj kuniĝis tuta loĝantaro fervorplene alkurinta.

Unuj kunportis stangojn, aliaj ŝtupetarojn, aliaj krucifiksojn aŭ trunketon de sankta bukso, per kiuj ili pensis ekkapti pli facile la vindotukojn altiriĝentaj per tiu sankta magneto.

La fajrpumpistoj baldaŭ alkuris plimultigante la malordon per la akra sono de siaj trumpoj kaj la galopo de siaj ĉevaloj.

Sed, la vindotukoj, ŝajnis moki la pastrojn kaj iliajn benojn, la piulinojn kaj siajn krucifiksojn, la fajrpumpistojn kaj iliajn ŝtupetaregojn!!

Ili daŭrigis sian forflugadon sur ĉiujn tegmentojn.

Iafoje, ili haltis sur la bordo de kornico, volviĝis ĉirkaŭ la kamentubo. Supre, de tie, pinto de la sankta ŝtofo moveτiĝis ironie kontraŭ la amaso, kiel ĉu ĝi eltirus la langon...

Kaj tuj kiam alveninta penige sur la tegmenton, oni pensis atingi ilin, ili ŝajnis murmureti : « Ĝis la revido » kaj forflugis pli malproksimen, senhontaj kiel ŝoristaj infanoj.

Post unu horo de tiu-ĉi ludado, ili forflugis en liberan spacon kaj la amaso baldaŭ nenion pli vidis sur la blua ĉielo, ol malgrandetan blankan punkton ĉielirantan sur la horizonton.

En malproksima posturbo, al la tuta ekstremajo de ĝi, en malpurega dometo, virino lulis novnaskiton sur siaj genuoj.

Ŝi rigardadis ĝin kun malluma amemo kaj kovris ĝin

per ŝmacoj, havante nenian alian veston por doni al ĝi ol siajn dolorplenajn lipojn.

Per la fenestro malfermita pro disligitaj kadrajoj, rompitaj vitrajoj, la malvarmo kaj la vento antaŭpromesis mizeran kristnaskfeston.

La infano nuda estis jam rigida kaj blanka, kvazaŭ Jesueto farita el vakso. — Dio mia! Dio mia! Ĉu li estas jam preta por tiel morti, tiu senkulpulo, veninta en la mondon por suferi unu horon? La patrino stariĝis kaj turnis sovaĝe ĉirkaŭ la silenta ĉambro. — Nenio!!!

Ŝi nenion trovis por ŝirmi la malgrandan karnon prezentata en ĝia infana pureco.

Ŝi residiĝis. — Ŝi ne ploris, ĉar la larmoj estas ankoraŭ riĉeco! Ŝiaj okuloj mem estis senploraj!!

Apud ŝi, ekzistis nur vento kaj malvarmo.

Ili eniriĝis krakigante siajn lignajn ŝuojn. Ili proksimiĝis kun siaj sovaĝaj kaj glaciigitaj mienoj.

Estis la malbonaj Magioj (Demonoj) alportantaj al la novnaskito la donacojn de agonio.

— Kristnasko! Kristnasko! pensis en si mem la patrino. Ili plendis en Betlehemo la dian infanon, sed Li, havis almenaŭ pajlon en sia manĝujo kaj la bestoj ĉirkaŭ Li revarmigis Lin per sia elspirajo!!

La patrino ne povante plu plori montris la pugnon al la ĉielo por malbeni kristnaskan feston...

Sed sia pugno refalis antaŭ la adorinda miraklo!!

Apud la duone malfermita fenestro, blanka objekto svingiĝis. Tio-ĉi alvenis de la spaco. Tio-ĉi similis al birdo ekpeteganta rifuĝejon.

Poste, dolĉe, la blanka objekto eniris la ĉambreton. La patrino alrigardis! Vindotukoj!!!

Kaj la tute nuda infano estis baldaŭ envolvita en la vindotukoj de l'Infano Jesuo!!!

*Tradukis de* Jean Madeline

*H. de Coppet.*

# NOVA JARO

Denove plenumas
Rondiron la tero;
Denove eklumas
Nun ĉies espero.

Kaj kion plej altan
Ni ĉiuj aliras,
Konfidon senhaltan
Denove inspiras.

Lastjara sukceso
Kuraĝon liveru;
Novjara progreso
Riĉege prosperu.

Oscar Bünemann.

## Moustiques ! Moustiques ! !

# LE MOUSTIKOL

(Déposé)

Supprime **instantanément** les Démangeaisons occasionnées par les piqûres de **MOUSTIQUES, GUÊPES, PUNAISES, PUCES, etc.** — Le flacon : **1 fr. 50**.

Vente en Gros : **PIOT & LEMOINE**, 117, rue Vieille-du-Temple, Paris.

---

# Pharmacie des Deux Mondes

**A. LÉGER, Pharmacien de 1re classe**

**2, Rue des Tournelles - Bastille - Rue St-Antoine, 8**

**PRIX LES PLUS RÉDUITS**

Livraison tous les jours dans Paris et en Banlieue sans augmentation de prix. — Expéditions en Province.

Demander le **Catalogue** accompagné d'un petit manuel de *Médecine* et de *Pharmacie*, envoyé **gratis** et **franco** sur simple demande.

---

## *HYGIÈNE de l'INTESTIN*




## *CONSTIPATION*

Echantillons gratuits sur demande.


Refuser les contrefaçons comme on refuse la fausse monnaie.

Bien exiger la marque :
**Chatel-Guyon Miraton, France.**

---

# FARINE LAVILLE

## FLEUR D'AVOINE LACTÉE



Médaille d'Argent
Médaille d'Or
Diplôme d'Honneur

« L'aliment d'avoine convient en tout temps, à tout âge, et à toute sorte de tempéraments. »

Lémery
*Ancien Doyen de la Faculté de Paris.*

La Boite : fr. 1,50, dans toutes Pharmacies et Herboristeries.




Le Gérant : E. Ollivier.

Imprimerie Espérantiste V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.